Ho, Kaliningrado ! Ho, Kantio !

La plej absurda eŭropa urbo inter Kantio kaj Kalinin

Obskuraj farb-atencoj kontraŭ la monumentoj honore al Kantio vekas denove atenton pri preskaŭ forgesita eŭropa urbo.
Kiel rusaj naciistoj sukcese evitis, ke la flughaveno de Kaliningrado estu nomata laŭ la germana filozofo Kant.

De Andreas Künzli (Svislando)

Fonto: https://ru.wikipedia.org/wiki/Кёнигсберг

Kaliningrado, la plej okcidenta urbo de Ruslando, eble estas la plej malbela kaj absurda urbo en Eŭropo, pro sia ege tragika historio, kiu estas unika. La urbo oscilas inter Kantio kaj Kalinin, la ĉefaj simboloj de la germana kaj sovetia tempoj, kiel celas montri la ĉi-sekva artikolo.

Anonimaj farb-atencoj kontraŭ monumentoj honore al Kantio

En la frua mateno de la 27a de novembro 2018 la monumento honore al Kantio, kiu staras vidalvide de la kaliningrada universitato, estis ŝmirita de nekonata(j) persono(j) per rozkolora farbo. Iu gardisto, kiu ĵus ĉirkaŭiris la universitaton, vidis iun viron forkuri de tie. Apud la monumento oni trovis flugfoliojn, sur kiuj estis skribite: „Krucosignu vin per la ortodoksa kruco antaŭ tiu malamika nomo, antaŭ germano, kies popolo alportis al ni tiom multe da sufero“ kaj „Kantio perfidis la rusan teron, kiu akceptis lin“. La anonima aŭtoro avertis la studentojn, ke ili „studas inter muroj, kiuj portas la nomon de malamiko“, kaj rekomendis al ili „malmunti la ŝildojn kun la nomo de Kantio kaj elradikigi la fremdan nomon el viaj dokumentoj“. La groteska ironio de la okazaĵo estis, ke la farbo, kiu estis ĵetita kontraŭ la monu-mento, troviĝis en konjaka botelo de la marko „Malnova Königsberg“.

En la sama nokto nekonata(j) atakinto(j) malpurigis ankaŭ la tombon de Kantio ĉe la katedralo. Krom tio, la memortabulo ĉe la loko de la iama loĝdomo de Kantio estis same malpurigita.

En Ruslando oni nomas tiajn atakojn kontraŭ tiaj monumentoj „vandalismo“. La polico klopodas ekscii la identecon de tiuj obskuraj vandaloj. La makulitaj monumentoj pri Kantio kaj lia tombo estis senprokraste purigitaj. Eble tiel la honoro de Kantio tamen povis esti savita en Kaliningrado.

La nuntempa monumento honore al Kantio estas rekonstruaĵo de la skulptaĵo de Christian Rauch, kiu antaŭmilite staris en la korto de la Alberta universitato. La aŭtoro de la nuna skulptaĵo, kiu estis starigita en 1992 en sia historia loko, estis Harold Haacke. La monumento havas la statuson de objekto kun kultura signifo kaj troviĝas sub ŝtata protekto.

Ankaŭ apud la tombo de Kantio estis trovitaj flugfolioj, kun jena teksto: „Des pli ĝojiga estas la novaĵo, ke la nomo de la germana Kantio ne malpurigos nian flughavenon!“[1]

Pri kio temas?

„Konkurso“ pri renomado de la kaliningrada flughaveno

Antaŭ kelka tempo la ruslanda ministerio de la kulturo (Vladimir Medinskij) lanĉis kune kun la „Socia Ĉambro“ (kiu estas kontrolata de la Kremlo) kaj la Ruslanda Geografia Societo (kies estroj estas Putin kaj defendo-ministro Sergej Ŝojgu) voĉdonon por serĉi taŭgan kromnomon por 47 ruslandaj flughavenoj. Iu ĉi-koncerna retujo indikis proponojn pri historiaj personecoj, ĉefe verkistoj, sciencistoj, inĝenieroj, multaj militestroj kaj militherooj kaj kelkaj virinoj. Dum enlandaj flugoj de la ŝtata flugkompanio Aeroflot oni disdonis enketilojn. La kampanjo estis apogata ankaŭ de la ultrakonservativa kaj naciisma metropolito Tiĥon/Ŝevkunov (konata ankaŭ kiel „baptopatro de Putin“), kiu ofte kutimas klarigi al la ruslandanoj la ´ĝustan´ interpreton de la historio. Por la flughaveno de Kaliningrado-Ĥrabrovo (iama germana Powunden) eblis elekti aŭ *generalon Ivan Ĉernjaĥovskij* (kiu pereis antaŭ ol komandi la atakon kontraŭ Königsbergo en aprilo 1945), aŭ *marŝalon Aleksandro Vasilevskij* (kiu transprenis la komandon de Ĉernjaĥovskij kaj ordonis la atakon kontraŭ Königsbergo en tiu monato), aŭ *carinon Elizaveta Petrovna* (la filinon de Petro la Granda, kiu aneksis Königsbergon en 1758),[2] aŭ la germanan filozofon *Immanuel Kant*. En tiu enketo Kantio rapide gajnis. Sed tio tute ne plaĉis al iuj „patriotoj“ de Ruslando, ĉar la nomelekto devis trafi personecon, kiu havas tutlandan signifon, ne por kontentigi ies lokan orgojlon. Por tiuj „patriotoj“ la nomo de Kantio, kiu fariĝis perfidulo de la patrujo, ne estis akceptebla. Tiel, ekzemple Marat Barijev, deputito de la ruslanda Dumao el Tatarstano, opiniis, ke estas „malpatriotisme“ nomi la flughavenon de Kaliningrado laŭ Kantio, kaj proponis marŝalon Vasilevskij, kiu originis el Volgio. Vicadmiralo Muĥameĉin, komandisto en la haveno de najbara Baltijsk (Pillau), misfamigis Kantion en iu publika parolado antaŭ siaj soldatoj en ĝis nun nekonata maniero, nomante lin hipokrita perfidulo, kiu verkis nekompreneblajn librojn, kiujn liaj soldatoj ne konas, kaj same pledis por Vasilevskij. Krom tio okazis aliaj malbelaj incidentoj. Iu veterano el la regiono Ivanovo, kie generalo Vasilevskij naskiĝis, plendis, ke la homoj en tiu regiono ne konsentas, se oni nomos la kaliningradan flughavenon laŭ Kantio anstataŭ Vasilevskij, ĉar laŭ ilia opinio Kantio faris nenion utilan por la lando. Estas rimarkinde, ke la kaliningradaj pensiuloj tute ne havas problemon kun la nomo de Kantio. Vladimir Vukolov, reprezentanto de la „Partio de la pensiuloj“, komunikis, ke la demando estis diskutita en lia organizaĵo kaj neniu plendis pri la nomo Kantio kiel nomo por la flughaveno. Li aldonis, ke la nomo de Kantio, male, estas populara en Kaliningrado, „ĉar ni bone vivas kune kun la kulturo, kiun ni heredis. Ni renkontas tiun nomon ĉiutage kaj fieras, ke ni havas tiajn samlandanojn, kiuj iam aktivis sur ĉi tiu tero.“ Sed la deputito de la kaliningrada distrikto en la ruslanda Dumao, Aleksandr Pjatikop, dividis la starpunkton de sia kolego el Tatario. Ne nur tio. Li lanĉis novan enketon por eltrovi la ´veran´ opinion de la loĝantaro de la kaliningrada distrikto. Tiel, subite gajnis la enketon, en kiu laŭdire partoprenis 144 mil homoj, Elizaveta Petrovna, kiu ricevis 34 procentojn de la voĉoj, dum Kantio kaj Vasilevskij ricevis nur po 27 procentojn kaj Ĉernjaĥovskij eĉ tute postrestis per 11 procentoj de la voĉoj. Kial ŝi subite povis fariĝi tiel populara, restas enigmo, ĉar la plimulto de la loĝantoj de la kaliningrada distrikto ne scias, kion komunan tiu carino havas kun tiu regiono (vd. pli sube). Pozitivan rilaton al tiu germana regiono ŝi ne povis havi, ĉar ŝia ministro pri eksteraj aferoj, Bestujev, estis malamiko de Prusujo kaj Francujo. Ĉu la enketo do estis falsita?

Kvankam la motivoj por la farb-atencoj kontraŭ la monumentoj de Kantio dume ne klariĝis, Klemeŝev, direktoro de la kaliningrada universitato, vidis ligon kun la voĉdono pri la nova kromnomo de la flughaveno. Guberniestro Anton Aliĥanov klarigis, ke „temas pri manipulado de la publika opinio fare de la politteknologoj”. Politteknologoj estas specialuloj, kiuj ´organizas´ kaj influas la publikan opinion laŭ politika oportuneco por ricevi la deziratajn politikajn rezultojn. Ankaŭ la prezidanto de la

[1] Rimarkinde, ke en la koncerna artikolo de la rusa Vikipedio mankas informo pri tiuj incidentoj (vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Памятник_Канту_(Калининград), kvankam la rusa gazetaro raportis prie.
[2] https://de.wikipedia.org/wiki/Iwan_Danilowitsch_Tschernjachowski, https://de.wikipedia.org/wiki/Alexander_Michailowitsch_Wassilewski, https://de.wikipedia.org/wiki/Elisabeth_(Russland).

kaliningrada urba konsilio, Andrej Kropotkin, ne kredas, ke estis nur kelkaj huliganoj, sed li estas konvinkita, ke temis pri organizita provoko.

La reprezentanto de la politika partio „Jabloko" rememorigis la frazojn de prezidento Vladimir Putin, kiu antaŭ studentoj de la kaliningrada unversitato diris en 2013, ke „Kantio ne estas kaj ne estu nur simbolo por ilia universitato, sed iusence ankaŭ simbolo de la tuta regiono, de la tuta kaliningrada distrikto." Kaj menciante la verkon „Eterna paco" de Kantio, publikigita en 1795, kiu anticipis kelkajn gravajn principojn de la moderna internacia juro,[3] kiujn Sovetunio kaj Ruslando tiel draste kaj sisteme lezis, Putin, la cinika postsovetia revenĝisto, kiu fatale rekondukis sian landon en la malhelon de la reakcia diktaturo, laŭdis tiun verkaĵon kiel unuan provon pravigi la unuiĝon de Eŭropo post la Sepjara Milito. „En tiu senco la figuro de Kantio reprezentas simbolon por la nuntempa mondordo." La fina rezulto de la groteska ekzerco estis, ke laŭ prezidenta dekreto de la 28a de novembro 2018 la kaliningrada flughaveno Ĥrabrovo ne ricevos kromnomon. Ŝajnas, ke guberniestro Aliĥanov kaj la loĝantaro de Kaliningrado estas kontentaj pri tiu solvo.

Kantio

Ekde la jaro 2005 la kaliningrada universitato portas la nomon de la fama germana filozofo *Kantio*. Tiam oni festis la 750an datrevenon de la fondo de Königsbergo. La renomado okazis en la ĉeesto de la ruslanda prezidento Vladimir Putin kaj de la germana kanceliero Gerhard Schröder. La malnova Alberta universitato estis kune kun la historia urbocentro detruita de britaj bomboj en aŭgusto 1944. Anstataŭ la malnova centra domo staras nun malbelega sovetieca konstruaĵo. Multaj homoj demandis sin, kion oni fakte festas aŭ festu, ĉar Königsbergo ne plu ekzistis jam de 60 jaroj.[4]

Immanuel Kant naskiĝis la 22an de aprilo 1724 en Königsbergo, kie li ankaŭ mortis en 1804. En 1740 li komencis studi natursciencojn, filozofion kaj matematikon en la Alberta universitato. Kiam lia patro mortis (en 1746), li dume devis forlasi la urbon kaj gajni sian monon kiel privata instruisto en la orientprusa provinco. En 1754 Kantio revenis al Königsbergo, kie li publikigis kelkajn filozofiajn studojn, kiuj trovis nur malgrandan intereson. Baldaŭ li defendis sian disertacion, per kiu li rajtis esti privatdocento. Kantio instruis logikon, fizikon kaj metafizikon, moralfilozofion, teologion, matematikon, mekanikon, geografion, antropologion, pedagogion kaj naturan juron. Nun liaj prelegoj trovis pli kaj pli fortan intereson ĉe la studentoj. Unu el liaj aŭskultantoj estis Johann Gottfried Herder, alia signifa germana verkisto kaj filozofo, kiu naskiĝis en orienta Prusujo.[5] La unua kandidatiĝo de Kantio por ricevi katedran postenon pri logiko kaj metafiziko fiaskis (en 1759), kaj alternativajn proponojn por instrui en Erlangen, Jena, Halle aŭ Mitau li rifuzis, kvankam tiuj postenoj estis pli bone pagataj. En la jaroj 1766-72 Kantio laboris kiel helpanto en la Reĝa Ŝtata Biblioteko, kiu estis lia unua oficiala dungiĝo. En 1770 li finfine ricevis, en la aĝo de 46 jaroj, la vokon de la Königsberga universitato por fariĝi profesoro pri logiko kaj metafiziko. En 1786-88 Kantio eĉ estis rektoro de la universitato. En 1787 li estis akceptita de la Berlina Akademio de la Sciencoj kaj en 1794 li fariĝis ankaŭ honora membro de la Ruslanda Akademio de la Sciencoj en Sankt-Peterburgo. Neniu do povas diri, ke li ne havis rilatojn kun Ruslando, sed male, li bone konis la rusajn politikon kaj pensmanieron. Hodiaŭ apenaŭ plu konata fakto estas, ke Ruslando sub ĝia carino Elizabeto Petrovna (Romanov)[6] aneksis en 1758-62 orientan Prusujon dum la Sepjara Milito post gajnita milito kontraŭ la germanoj. Tiuj jaroj kongruis kun la vivotempo de Kantio. Ŝajnas, ke tiam la rusaj mastroj sufiĉe afable traktis Königsbergon kaj nenion detruis, sed ĉefe postulis pagadon de impostoj, kiujn ili sendis al Ruslando.[7]

La plej lastaj dek kvin vivojaroj de Kantio estis karaterizataj de la batalo kontraŭ la cenzuro, kiu akriĝis sub la prusa reĝo Frederiko Vilhelmo IIa. Kvankam Kantio estis akre atakita per seriozaj riproĉoj pro herezaj instruoj sur la tabua tereno de la kristana religio, Kantio daŭrigis instruadi ĝis 1796, sed li devis respekti la ordonon, ke li ne tuŝos la religiajn dogmojn, se li ne konformas al la Biblio.

[3] Ŝajnas, ke Putin ne sentas sin tro koncernata de la maksimoj, kiujn Kant proklamis en sia „Eterna paco", aŭ li interpretas ilin alimaniere, kaze ke li entute konas ilin (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zum_ewigen_Frieden).
[4] Filmon pri malnova Königsberg vd. sub https://www.youtube.com/watch?v=g5Idza0B6mA.
[5] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Gottfried_Herder.
[6] Filino de Petro Ia (la Granda) kaj Katarino Ia (vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Elisabeth_(Russland)).
[7] Detale pri ĉi tiu periodo v. ĉe Manthey, p. 277-95.

En Königsbergo Kantio skribis kelkajn famajn verkaĵojn: Kritiko de la pura racio (1781), Baza verko pri la metafiziko de la moralo (1785), Kritiko de la praktika racio (1788), Kritiko de la juĝpovo (1790), La religio en la limoj de la nura racio (1793), La eterna paco. Filozofia manuskripto (1795), La metafiziko de la moroj (1797) k.a.[8]

En 1789 eksplodis la Franca Revolucio, kiu proklamis la maksimojn de la Libereco, Egaleco, Frateco. Anstataŭ revolucio, Kantio preferis evolucion.

Kantio, la nekomparebla orientprusa intelekta originalulo, esence pasigis sian tutan vivon en Königsbergo, kie li forpasis 80-jara la 12an de februaro 1804. Lia tombo troviĝas je la ekstera flanko de la Königsberga Katedralo, kiu mirakle ne estis detruita dum la dua mondmilito, kiam britaj aviadiloj bombadis la urbon.

Do, la meritoj de Kantio por la filozofio kaj la internacia kleriga kulturo ne devas esti aparte substrekitaj ĉi tie. Hannah Arendt, kiu mem originis el Königsbergo,[9] kiun ŝi forlasis en 1933, priskribis Kantion kiel plej unikan filozofon depost Sokrato. Diagnozinte la malbonon en la homo, Kantio pledis por lia edukado en la senco de la bono kadre de respubliko de liberaj (mond)civitanoj kun eterna paco. Kantio kritikis la absolutismon, abomenis la prusan militismon kaj adoris la pacismon.[10] En sia ĉefverko „Kritiko de la pura racio“ la humanisto postulis, ke en la epoko de la raciismo ĉio devas esti submetata al kritiko, inkluzive la politikon de la reĝo. Ŝajnas, ke Kantio pretis toleri aŭtokratiisman despoton kiel regnestron, kondiĉe ke li regu la landon laŭ la leĝoj de la respubliko.

Kompreneble, Lenin, kiu renversis la tutan sistemon de la burĝa raciismo, rifuzis la filozofion de Kantio, donante la preferon al Hegel, kun fatalaj sekvoj.

La fakto, ke dum la hitlera tempo orienta Prusujo estis elstara bastiono de la naziismo, estas nature ege malkonvena kaj hontinda temo por la germana flanko. Okaze de la plej lasta demokratia baloto al la parlamentaj elektoj en marto 1933, la partio NSDAP ricevis en Orienta Prusujo per 56,5 procentoj la plej multajn voĉojn de ĉiuj elektejoj en la Germana Regno. Kune kun la voĉoj de la germana naciisma partio DNVP la voĉdonrajtaj civitanoj de Orienta Prusujo donis 67,8 procentojn al dekstremaj partioj. Nur en Pomeranio la procentaĵo estis pli alta, dum ekzemple en la okcidenta elektejo de Kolonjo-Aĥeno la dekstremaj partioj kune ricevis nur 35,7 procentojn de la voĉoj. La loka potenculo de nazia Orienta Prusujo fariĝis Erich Koch, kiu originis el la Rejna lando kaj respondecis ankaŭ por la genocido kontraŭ la polaj kaj ukrainaj judoj, kiel germana komisaro por la okupata Ukrainio.[11]

En la jaro 1925 de 279´930 loĝantoj de Königsbergo 91,7 % estis protestantoj, 4,8 % katolikoj kaj 1,5 % judoj.

Lige kun la naziismo en Orienta Prusujo indas ankaŭ rememorigi la sorton de la judoj en tiu regiono. Pro diskriminacio kaj senrajtigo multaj judoj forlasis sian patrujon. La juda loĝantaro malkreskis de 3200 en la jaro 1933 al 2100 homoj en 1938. Post la 9a de novembro 1938 ankoraŭ 500 komunumanoj povis forlasi la urbon Königsberg. Hugo Falkenheim estis la plej lasta judo, kiu en oktobro 1941 sukcesis forfuĝi. La ceteraj judoj de Königsbergo estis mortigitaj. La 24an de junio 1942 de la vara stacidomo forveturis trajno kun deportitaj judoj al Minsk en Belorusio, kie ili estis mortpafitaj en la fosoj de la neniigejo Maly Trostinec. 763 Königsbergaj judoj estis deportitaj al la koncentrejo Theresienstadt en Ĉeĥio, de kiuj 59 ankoraŭ vivis, kiam la tendaro estis liberigita en 1945. Komence de 1944 en Königsbergo vivis 60 judaj familioj. La malmultaj judoj, kiuj restis post la dua mondmilito en Königsbergo, estis kune kun la restintaj germanoj en 1948 forpelitaj de la sovetianoj. Unu el la plej lastaj Königsbergaj judoj nomiĝis Immanuel Jakobovits, kiu oficis kiel ĉefrabeno de Grandbritio inter 1967 kaj 1991. Pri la ĉeesto de la judaro en Königsbergo ĉefe memorigas la juda tombejo en la orienta urboparto, kie ĝi estis detruita kaj prirabita.[12] La Malnova kaj Nova Sinagogo (en la iama Seiler-strato) estis detruita dum la fifama pogroma nokto de la 9a de novembro 1938.[13]

[8] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Immanuel_Kant.
[9] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Hannah_Arendt.
[10] Dum la vivotempo de Kantio regadis jenaj prusaj reĝoj: Frederiko Vilhelmo Ia (1713-40), Frederiko IIa (la Granda, 1740-86), Frederiko Vilhelmo IIa (1786-97) kaj Frederiko Vilhelmo IIIa (1797-1840).
[11] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Erich_Koch#Gauleiter_in_Ostpreußen.
[12] Liu „au https://de.wikipedia.org/wiki/Jüdische_Gemeinde_Königsberg#Geschichte_der_jüdischen_Gemeinde.
[13] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Alte_Synagoge_(Königsberg).

Kaliningrado

Ĉar Königsbergo situis geografie iom flanke, dum la dua mondmilito (1939/41-45) ĝi dume restis netuŝita de ĝi, ĝis kiam en aŭgusto 1944 ĝi travivis unuajn gravajn atakojn fare de la brita armeo. La 6an de aprilo 1945 la Ruĝa Armeo komencis sian ĝeneralan atakon kontraŭ Königsbergo. La enfermitaj germanaj trupoj rifuzis la kapitulacon, kiun Sovetunio proponis, kaj daŭrigis defendi la urbon por evakuadi la popolon.

Apogata de 1500 aviadiloj, la sovetia armeo atakis la urbocentron kaj devigis la germanojn kapitulaci. Laŭ sovetiaj indikoj, en tiu batalo pereis 13´430 germanaj soldatoj kaj 57´640 estis malliberigitaj, inter ili tri generaloj.[14] Laŭ tiamaj atestantoj, sovetiaj soldatoj plenumis neimageblajn barbarajn krimojn kontraŭ la civila germana loĝantaro, kiuj inkluzivis amasajn marodadon, rabadon, mortigadon, detruadon kaj sekspertfortadon de virinoj, kiujn la sovetia historiografio prisilentis, sed kiujn la homaro ne forgesis.[15]

Ĝis 1936 la oficiala nomo de la urbo estis *Königsberg i. Pr.*, poste *Königsberg (Pr)*. Inter 1945 kaj 1946 ĝi portis la rusigitan nomon *Кёнигсберг* („Kjonigsberg“). La litovoj nomas la urbon *Karaliaučius*, la poloj *Królewiec*. La nomon Kaliningrad la urbo ricevis la 4an de julio 1946, unu monaton post la morto de Kalinin.

Postmilite, nur malmultaj Königsberganoj restis en la urbo, kiu estis fermita por eksterlandanoj kaj transformita al sovetia militbazo. La ´novaj´ loĝantoj de Kaliningrado, sovetiaj civitanoj el plej diversaj regionoj de la imperio, do havis siajn historiajn kaj kulturajn radikojn ekster tiu urbo. La sola komuna ideo, kiu ligis ilin, estis la konscio, ke ilia urbo estas trofeo de la venko pri la nazia Germanio. La rusa propagando ĉiujare laŭte kaj pompe rememorigas tiun venkon, dum Germanio humile rekonsciigas pri sia historia kulpo. Sed kian prezon tiu venko havis ? La germana popolo estis forpelita per grandioza brutaleco, la resto de la urbo estis detruita de la novaj mastroj mem por forviŝi la spurojn de la germana pasinteco, kio nature ne tute sukcesis. En Kaliningrado kaj ties (dezerta) ĉirkaŭajo oni trovas paŝon post paŝo mutajn atestaĵojn de la longa glora germana pasinteco, kiu ekzistis antaŭ 1945. Ĉu do oni povas fieri pri tia venko estas malfacile diri. Cetere, la nuntempaj kaliningradanoj ne konsideras la germanojn malami-koj.

En 2017 Kaliningrado havis 470 mil loĝantojn laŭ jena etna konsisteco: 87,4 % rusoj, 4,0 % ukrainoj, 3,8 % belorusoj, 0,8 % armenoj, 0,5 % tataroj, po 0,4 % litovoj, germanoj kaj azerbajĝananoj, kaj po 0,3 % uzbekoj kaj poloj (stato de 2010).

La renomado de la kaliningrada universitato do ne okazis simple tiel. La urbo jam de longe flirtas kun sia germana historio, kiu tute ke kongruas kun la aktuala stato. Aliflanke, la randa situacio de Kaliningrado kiel eksklavo de Ruslando postulas pli fortan ligiĝon kun la cetera ŝtato, des pli en tempo de pli agresema patriotisma vento, kiu venas el Moskvo. Sed en Kaliningrado ekzistas ankaŭ la intereso kaj deziro interagi kun la najbara eksterlando, precipe Pollando kaj Litovio, kiuj estas membroj de Eŭropa Unio, krom tio nature ankaŭ kun Germanio. Intereson pri la internacia ekonomia integrado de Kaliningrado en la baltan kaj eŭropan regionojn havas sendube ankaŭ Moskvo mem. Do, Kaliningrado signifas por Moskvo ŝancon kaj riskon samtempe.

Kalinin

Tute alia problemo estas la nomo de la urbo mem, kiun ĝi ricevis, kiel menciite, de la sovetia politikisto Miĥail Kalinin.

Pro la esenca kunrespondeco de Kalinin por la masakro de Katyn (1940)[16] kaj aliaj krimoj faritaj dum la stalinisma tempo, en Kaliningrado oni diskutas ankaŭ pri renomado de la urbo laŭ la origina nomo. Tamen, pro diversaj kialoj tiu renomado ankoraŭ ne okazis ĝis nun, malkiel en la kazoj de la urboj Leningrado, Sverdlovsk kaj Kalinin, kiuj rericevis siajn malnovajn nomojn Sankt-Peterburgo,

[14] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Schlacht_um_Königsberg.
[15] Aliflanke, la vera estas ankaŭ, ke germanaj soldatoj eksperfortis virinojn en Ruslando, Belorusio kaj Ukrainio.
[16] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Massaker_von_Katyn.

Ekaterin-burg kaj Tver, kaj unu el la ĉefaj ´prospektoj´ en Moskvo, kiu portis lian nomon, ricevis la nomon Nova Arbato.

Sed kiu fakte estis Miĥail Kalinin? Miĥail Ivanoviĉ Kalinin naskiĝis la 7an (19an) de novembro 1875 en tre malriĉaj vivkondiĉoj en iu malgranda vilaĝo de la gubernio Tver kiel filo de kamparana familio. Tiam regis imperiestro (caro) Aleksandro IIa Romanov, kiu subskribis en 1861 la dekreton pri la liberigo de la servutuloj en la Ruslanda Regno. Kiel 14-jarulo Kalinin iris al Sankt-Peterburgo, kie kvar jarojn poste li fariĝis laboristo en iu municia produktejo, poste en la fama Putilov-fabriko. Tie li komencis politike aktivi en la „Unuiĝo de la batalo por liberigi la laboristan klason“ kaj en 1898 aliĝis al la Socialdemokratia Partio de Ruslando. Li funkciis kiel agento de la malpermesataj marksismaj gazetoj *Iskra* kaj *Pravda*. Li estis plurfoje arestita, post dekmonata restado en malliberejo deportita al Tiflis (Kartvelio) kaj Reval (Estonio), kie li laboris en iu fabriko, poste ĉe la fervojoj. En ambaŭ urboj li daŭrigis agadi en socialdemokratiaj kaj marksismaj cirkloj. La jarojn 1904-5 li pasigis en la karelia ekzilo kaj agitadis en la unua rusa revolucio de 1905-7. Por gajni monon Kalinin akceptis ajnan dungon kiel helplaboristo. En 1906 li edziĝis al virino el Estonio (Jekaterina Ivanovna/Johannovna Lorberg) kaj havis kun ŝi plurajn infanojn.[17] En 1908 lia familio translokiĝis al Moskvo, kie naskiĝis la unua infano. En 1912 Kalinin fariĝis membro de la oficejo de la Centra Komitato de la Socialdemokratia Laborista Partio de Ruslando (RSDPR). En 1913 li laboris en la Ajvaz-fabriko en Sankt-Peterburgo. La ekzistado kiel revoluciulo estis malfacila: La sistemaj persekutado, arestado kaj punado fare de la carisma polico trovis neniun finon. Kiam li sentis sin minacata kaj observata, Kalinin kaŝiĝis en Verĥnjaja Troica, la vilaĝo de liaj naskiĝo kaj gepatroj.[18] En januaro 1916 li estis arestita de la petrograda polico, malliberigita ĝis decembro kaj sendita al la ekzilo en orienta Siberio. De tie li fuĝis kaj revenis al Petrogrado, kie li malfermis malgrandan metiejon proksime de la Finnlanda Stacidomo, en kontraŭleĝa statuso, daŭrigante la partian laboron. Dum la Februara Revolucio de 1917 li gvidis la malarmadon de la sekreta polico kaj partoprenis la konkeron de la Finnlanda Stacidomo. En la sekva tempo Kalinin ludis la rolon de radikala bolŝevisma propagandisto. Post la „Oktobra revolucio“ de 1917 Kalinin fariĝis membro de la urba dumao kaj estis elektita kiel urbestro de Petrogrado nome de tiu dumao. En tiu ofico li profiliĝis kiel rigora, inteligenta kaj justa reorganizanto de la administracio de la ĉefurbo, kiu troviĝis en ege mizera stato. Post la likvido de la urba dumao en 1918 la ofico de la urbestro estis abolita kaj Kalinin elektiĝis kiel komisaro pri urba ekonomio. De Lenin Kalinin, kiu ne estis intelektulo, estis tre estimata, ĉar li estis kamparano kun forta ligo al la laboristoj. Post la morto de Jakov Sverdlov en marto 1919 la revoluciulo karieris sur la plej alta partia nivelo de la nova sovetŝtato, kiu tiam nomiĝis RSFSR. Kiel „tutruslanda“, poste „tutsovetia starosto“ (kio signifis ŝtatan ĉefon) li loĝis kaj laboris en la moskva Kremlo. En la tempo de la Interna Milito Kalinin veturis per speciala propaganda trajno tra la frontaj regionoj de la bataloj, kie li elpaŝis kiel parolanto en la Ruĝa Armeo kaj ĉe la loka loĝantaro, kies plendojn kaj petojn li kolektis. En la volga regiono li klopodis mildigi la sorton de la viktimoj de la malsato (en aŭtuno 1921 20 milionoj da homoj malsatis en Ruslando). Dum siaj vastaj vojaĝoj tra Ruslando, kien la nova sovetreĝimo devis esti enkondukita, Kalinin sentis la kontraŭstaron de ĉiuj flankoj de la popolo kontraŭ la politiko de la komunistoj, de la matrosoj de Kronŝtadt ĝis la kozakoj de norda Kaŭkazo. La kulakoj venĝis la kampanjon de la konfisko de lia posedaĵo, kiun la komunistoj lanĉis kontraŭ ili. Strikoj kaj ribeloj plioftiĝis inter kamparanoj kaj laboristoj. Krom tio, la laboron de la bolŝevistoj malhelpis menŝevistoj, socialismaj revoluciuloj, trockiistoj, la esenca politika heredaĵo de la antaŭrevolucia tempo. En marto 1921 Kalinin estis alelektita kiel kandidato de la politburoo de la CK de KPR(B). Post la fondo de Sovetunio en 1922/23 Kalinin estis elektita kiel unu el la prezidantoj de la Centra Ekzekutiva Komitato (VCIK) de USSR, kiu estis kreita de la stalina konstitucio de 1936, al kiu Kalinin kunlaboris en ĉi-rilata komisiono. Ĉi tiun oficon Kalinin okupis ĝis januaro 1938, kiam tiu organo estis abolita, por fariĝi prezidanto de la prezidio de la Supera Soveto de USSR. Per tiu funkcio, kiun li havis ĝis 1945, Kalinin do praktike estis la formala ŝtatestro de Sovetunio. Siajn oficojn li plenumis en la iluzia kredo, ke li estas la „plej supera instanco“ de la sovetŝtato kaj disponas pri la potenco de la popolo, tamen sen posedi la realan povon, kiun havis diktatoro Stalin, kiu tiris la fadenojn en tiu absolutisma ŝtato, en kiu ĉiuj aliaj politikistoj estis servistoj, marionetoj kaj pajlohomoj de Stalin. La germana ambasadoro en Sovetruslando, grafo Ulrich von Brockdorff-Rantzau,[19] kontribuis al tiu

[17] Ŝajnas, ke ŝia patro estis ortodoksa estono kaj la patrino juda (vd. https://www.geni.com/people/Ekaterina-Kalinina/6000000007562997067, http://www.pseudology.org/bolsheviki_lenintsy/lorbergei.htm).
[18] Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Верхняя_Троица.
[19] 1922-28, vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ulrich_von_Brockdorff-Rantzau.

mito, glorante Kalinin-on „plej granda potenco“, kiun li renkontis en sia vivo. Alia iluzio de Kalinin estis, ke la ŝtata riĉeco kreskas kaj la privata riĉeco malkreskas, kompare kun Usono, kie la riĉeco koncentriĝas en la manoj de kelkaj malmultaj personoj (Ruslando ĉiam komparis sin kun Usono). Kvankam Sovetunio ekonomie prosperis dum la tempo de la akcelata industriigo, la vera estas ankaŭ, ke la sovetia popolo restis ekstreme malriĉa sub la kondiĉoj de la socialismo. Tiu socialismo estis alia iluzio, ĉar dum la stalinisma epoko Sovetunio definitive perdis sian socialisman karakteron, pri kiu la maldekstruloj revis en la tuta mondo. Ĉu Kalinin reale komprenis tiujn problemojn ne estas klare.

Dum la dua mondmilito Kalinin vigle agitis skribe kaj parole.

La 19an de marto 1946 Kalinin, kiu estis grave malsana, estis liberigita de sia ofico kiel prezidanto de la Supera Soveto de USSR, sed li restis elektita kiel membro de tiu soveto. Kalinin, la simbolo de la soveta potenco kun la karakteriza pinta barbo, forpasis la 3an de junio 1946 pro kancero kaj estis entombigita sur la Ruĝa Placo en Moskvo apud la Kremla Muro.

Kalinin posedis jenajn sovetiajn ordenojn kaj medalojn: Ordeno de la Ruĝa Flago (1928 kaj 1930), Heroo de la Socialisma Laboro (1944), Lenina Ordeno (1935, 1944 kaj 1945), medaloj „Por la defendo de Moskvo“ (1944), „Por la Venko pri Germanio“ (1945) kaj „Por brava laboro en la Granda Patrolanda Milto 1941-1945“ (1945).

La rolo de Kalinin dum la stalinisma teroro

Malgraŭ sia formala pozicio, per kiu oni (t.e. la Okcidento k.a.) klopodis bagateligi lian politikan rolon en la sovetia ŝtato, Kalinin sendube havis aliron al la potenculoj de tiu ŝtato kun ĝia propra jura sistemo, des pli ke li estis membro de la politburoo de la sovetia KP, la potenccentro de la sovetia ŝtato. Kalinin estis lojala servisto de Stalin, kio faris lin same danĝera kiel ekzemple la bulgaran staliniston Georgi Dimitrov por Bulgario, ĉar ĉiuj tiuj lakeoj de Stalin ne kontraŭstaris la proponojn kaj ordonojn de la ĉefa gvidanto, kaj subskribis la decidojn, kiujn Stalin persone faris, kadre de la politika sistemo, kiun ili reprezentis kaj kiu ne estis kritikebla.

Post la morto de Lenin (januaro 1924) Kalinin helpis akceli la kolektivigon de la agrikulturo[20] (pri kiu li asertis, ke ĝi devas okazi sen perforto kaj libervole), rapidigi la industriigon kaj fortigi la batalon kontraŭ la senalfabetigo. Kalinin estis ankaŭ unu el la organizantoj de la senkulakigo. Kiel klaso la kulakoj devis esti elsarkitaj. Lia subskribo troviĝis kune kun la subskriboj de A. Rykov kaj A. Jenukidze sub la ĉi-rilata decido de la CIK kaj de la Soveto de la Popolaj Komisaroj de USSR de la 1a de februaro 1930, kiu estis publikigita sub la titolo „Pri la rimedoj de la fortigo de la socialisma reorganizado de la agrikulturo en la regionoj de la deviga kolektivigo kaj de la batalo kontraŭ la kulakoj“. Kiam en januaro 1930 Kalinin estis demandita de iu loĝanto de Meza Volgio kion fari kun la kulakoj, li respondis: „Forpeli ilin al foraj lokoj, kie ekzistas nur malbona grundo, kaj forpreni de ili la personajn produktilojn favore al la kolĥozoj“. En la sovetia sistemo Kalinin rapide adaptis sin al la kurso de Stalin, kiu konis neniun pardonon, ekzemple en la batalo kontraŭ la „dekstra kaj maldekstra opozicio“. Kalinin apogis la eksigon de Grigorij Zinovev kaj Lev Trockij el la partio, sed ankaŭ la procesojn kontraŭ Nikolaj Buĥarin, Aleksej Rykov kaj Miĥail Tomskij. La 1an de decembro 1934, en la tago de la mortigo de Sergej M. Kirov en Leningrado, Kalinin subskribis dekreton, kiu esence servis al la organizado kaj jura pravigo de la amasaj reprezalioj kontraŭ la sovetia popolo, de kiuj milionoj da homoj estis koncernataj. En tiu dekreto („pri ŝanĝoj de la punprocesa ordo de la uniaj respublikoj“) estis fiksita la jura proceduro, kiu estis aplikenda kontraŭ homoj, kiuj estis akuzitaj pro terorismaj aktivecoj kontraŭ reprezentantoj de la sovetia ŝtato. Laŭ tio, la juraj procesoj kontraŭ koncernitaj akuzitoj devis esti plirapidigitaj, plendoj, apelacioj kaj petoj pri indulgo ne estis permesataj kaj la efektivigo de la mortpuno devis okazi tuj post la verdikto. Ĉi tiu „leĝo de la unua de decembro“ rompis ĉiujn jurajn normojn de la civilizita mondo, malfermis la pordon al arbitra perforto kaj enkondukis la „Grandan Teroron“, kiu celis la neniigon de ĉiuj opoziciuloj kaj „popolaj malamikoj“, entute kelkaj milionoj da personoj.[21] Kalinin ankaŭ ofte subskribis la fifamajn listojn de mortpafotaj homoj, kiuj estis senditaj al ĉiuj membroj de la

[20] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Zwangskollektivierung_in_der_Sowjetunion#Zwangskollektivierung_und_Entkulakisierung, https://de.wikipedia.org/wiki/Entkulakisierung.
[21] Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Großer_Terror_(Sowjetunion).

politburoo. Li apogis ankaŭ la vastigon de la reprezalioj al Belorusio. Lia subskribo troviĝis sur iu dokumento de la unua sekretario de la CK de la belorusa KP, Vasilij Ŝarangoviĉ, laŭ kiu devis esti mortpafitaj 3 mil homoj kiel „kontraŭ-revoluciuloj“ kaj forpelitaj 9800 „malamikaj elementoj“ el Belorusa SSR. Ĉu Kalinin subskribis tiujn dokumentojn sub premo, libervole, pro konvinko kaj ideologia blindeco aŭ pro devigo al la formala ofico, kiun li havis, aŭ ĉu li almenaŭ konsciis, kion li faris kaj faras, ne estas klare, ĉar la oficialaj sovetiaj dokumentoj de tiu tempo ne donas respondon al tiaj demandoj.

Ĉi tiuj problemoj kontrastas kun la aserto en la oficiala biografio, ke Kalinin akceptis nur malofte, ke homoj estu punitaj aŭ arestitaj, ĉar lia metodo konsistis en la arto konvinki, pruvi, klarigi. Li kredis je la potenco de la afablaj vortoj, kiu inspiras kaj kuraĝigas la homojn por instigi ilin fari pli multe.[22] Sed tiu konstato probable validis por la tempo de Lenin, dum la supre menciitaj dekretoj koncernas la stalinan tempon, kaj afablaj vortoj ne nepre ekskludas la aplikon de perforto.

Sennombraj civitanoj de Sovetunio skribis leterojn al Kalinin kun plej diversaj demandoj kaj petoj, ekzemple koncerne la konfiskon de la posedaĵo de kulakoj, maljustan traktadon aŭ areston, sendon al milita lernejo aŭ pro komplikaĵoj lige kun la laboro. Laŭ la legendo, kie Kalinin povis, li helpis persone aŭ tra sia sekretariejo solvi iun problemon, sed tiaj problemoj estis tro multaj kaj la okazoj de Kalinin por helpi maloftaj. Ekzemple en 1930 li ricevis 172,5 mil leterojn. Sed multaj plendoj restis netraktitaj (de tiuj 172,5 mil plendoj estis traktitaj nur 785 kazoj) aŭ estis rifuzitaj de la sekretariato de Kalinin.[23] Dum sennombraj homoj do vane esperis, ke Kalinin povos helpi al ili, multaj kolektivigitaj kamparanoj estis seniluziigitaj pri la starosto pro tio, ke li perfidis iliajn klasajn interesojn.

Tolmaĉov menciis du modelajn kazojn el la 30aj jaroj, en kiuj Kalinin pretis aŭ rifuzis helpi. Kiam iu kamparano el la volga regiono plendis ĉe Kalinin, ke la tieaj aŭtoritatoj klasifikis lian bienon kulaka entrepreno, konfiskis lian posedaĵon, postulis imposton kaj arestis lin, Kalinin esplorigis la aferon kaj venis al la konkludo, ke tia traktado de tiu kamparano ne estas pravigebla. Kalinin postulis puni la kulpajn aŭtoritatojn kaj rehonorigi la koncernan kamparanon, al kiu lia posedaĵo devis esti redonita. En alia kazo anoj de iu kolĥozo en la moskva regiono vizitis Kalinin en la Kremlo por postuli parton de la grundo de iu najbara kolĥozo por la disponigo al la propra kolĥozo. Kalinin rifuzis la peton per la klarigo, ke la koncerna kolĥozo posedas la grundon jam de pluraj jaroj kaj sekve rajtas utiligi ĝin por nelimigita tempo. Kie iuj petoj estis faritaj kontraŭ la leĝo, Kalinin ne povis helpi.[24]

Eĉ la propra familio de Kalinin ne estis protektata de la „Granda Teroro“: En majo 1938 estis arestita la nepo de la edzino de Kalinin, Miĥail Lorberg, akuzita kaj mortpafita (en aprilo 1939) pro „kontraŭ-revolucia agado“. Ankaŭ unu el la filoj de Kalinin estis mortpafita en la Kremlo. En oktobro 1938 Jekaterina Kalinina, la edzino de la ŝtatestro de Sovetunio, estis arestita surbaze de la kontraŭterorisma leĝo, kiun Kalinin mem subskribis post la murdo al Kirov. Laŭ noto de la NKVD de la 26a de februaro 1939 Kalinina estis akuzita pro kontraŭsovetia agado kaj rilatoj kun trockiistoj kaj la dekstra opozicio. Ŝajnas, ke ŝi kritikis la politikon kaj personecon de Stalin, kiun ŝi nomis tirano, sadisto kaj murdisto, pri kio agentoj informis la diktatoron.[25] Kiel „trockiisto“ Jekaterina, kiu estis membro de la bolŝevisma partio kaj revoluciulino, estis mistraktata en la prizono de Lefortovo kaj laŭ la fifama paragrafo 58 en aprilo 1939 kondamnita al 15-jara arestado en laborkoncentrejo en Kazaĥio, kie ŝi devis restadi ĝis la fino de 1945.[26]

La 5an de marto 1940 kvar membroj de la politburoo, nome Stalin, Voroŝilov, Molotov kaj Mikojan subskribis la proponon de Berija ekzekuti kelkmil polajn oficirojn. La konsento de Kaganoviĉ kaj Miĥail Kalinin estis konfirmita per „por“. Sekve, en arbaro ĉe Katyn estis mortpafitaj pli ol 4400 polaj oficiroj, kadre de serio de amasmurdoj kontraŭ „malamikoj de Sovetunio“, de kiuj entute 22-25 mil homoj, inter ili multaj oficiroj, policistoj kaj aliaj civitanoj de Pollando, estis koncernitaj.[27]

---

[22] Vd. Tolmaĉov, p. 153.
[23] Diversajn kazojn vd. sub http://statehistory.ru/1151/Vsesoyuznyy-starosta-M-I--Kalinin---radetel-za-unizhennykh-i-oskorblyennykh.
[24] Tiajn (banalajn) plendojn kaj petkazojn Tolmaĉov menciis en la ĉapitro „La oficejo de Kalinin“.
[25] Laŭ Torĉinov/Leontjuk, Vokrug Stalina, p. 241.
[26] Ŝi estis sendita al https://ru.wikipedia.org/wiki/Акмолинский_лагерь_жён_изменников_Родины. Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ekaterina_Kalinina.
[27] Detale vd. sub https://de.wikipedia.org/wiki/Massaker_von_Katyn.

Verŝajne la listo de tiaj respondecoj de Kalinin pri diversaj krimoj, kiujn la komunistoj konsideris necesaj por atingi siajn ideologiajn kaj politikajn celojn, estas pli longa. Sed lia biografio estis apenaŭ profunde prilaborita ĝis nun. Krom amaso da libroj kun politika-ideologia karaktero kaj kelkaj mallongaj enciklopediaj artikoloj, la ´faka´ literaturo pri Kalinin estas magra. La oficialaj biografioj, kiuj aperis pri Kalinin en la sovetia tempo, ne estas pli ol ridindaj propagandaj verkaĵoj kun hagiografia-fabela karaktero, kiuj celis gloradi la personecon kaj verkon de Kalinin kiel grandulo de la sovetkomunisma movado.[28] La *Granda Sovetia Enciklopedio* de 1953 lasis neniun dubon pri la elstaraj „meritoj" de Kalinin, se ĝi emfazis, ke li „gvidis senindulgan batalon kontraŭ la etmensuloj kaj kapitulaciantoj, trockiistoj, zinovevistoj, buĥarinistoj kaj naciaj deviantoj". Per tiu indiko ĝi embarase malkaŝis la sovetian politikon kaj pravigis la stalinisman teroron, kvankam la frazo devis havi alian sencon. En tiuj artikoloj kaj libroj nature komplete mankis ajna kritika traktado de la krimoj de la stalinismo, kiuj neniam estis punitaj en la lando, kie ili okazis.[29] Pli kritike traktata lia rolo dum la stalinisma teroro estis nur en iuj artikoloj aperintaj en la tempo de la perestrojko kaj glasnosto, ekzemple en la ĵurnalo *Ogonjok* en 1988. En oficiala partia dokumento de la jaro 1995, al kiu kunlaboris famaj altrangaj partiaj funkciuloj kiel A. Jakovlev, V. Medvedev, V. Ĉebrikov (KGB), A. Lukjanov, B. Pugo, k.a., la aŭtoroj donis al Kalinin „grandegan kaj ne pardoneblan kulpon" pri la reprezalioj de la 30-40aj jaroj, inter alie ĉar li „esence toleris la praktikon de la senjureco kaj amasteroro, lasante multajn skribajn petojn, ke la persekutitaj personoj estu indulgitaj, sen konsidero". Emfazita estis la „morala, politika, jura kaj krima naturo de tiu kulpo".[30] Multe pli ol tio oni ne trovas pri Kalinin, kiu probable estis samtempe kaj politika kulpanto kaj ideologia viktimo de la stalinismo. La esenca materialo probable troviĝas en la grandparte fermataj kaj sekretaj arkivoj de Moskvo kaj Ruslando.

Rusa militminaco el Kaliningrado

Pasintjare Kaliningrado vekis internacian atenton ankaŭ pro alia negativa novaĵo: En majo 2018 la Kremlo anoncis, ke oni starigis militajn raketojn de la tipo „Iskander" en tiu regiono. Tio signifas, ke tiuj raketoj, kiuj povas esti ekipitaj per nukleaj bomboj kaj flugas ĝis 500 kilometroj, povus atingi eĉ Varsovion, Berlinon aŭ Kopenhagon. La raketoj, kiuj estis lokitaj en Ĉernjaĥovsk (Insterburg), estis unuafoje videblaj en Kaliningrado dum nokta armea ekzerco por la parado de la 9a de majo. La Kremlo pravigis la starigon de tiuj raketoj kiel reagon al la poziciigo de NATO-batalionoj en la Baltaj Ŝtatoj kaj en Pollando en 2017. La rusoj cinike klarigis, ke oni ne celas timigi Pollandon kaj Litovion. Ĝuste tiuj landoj sentas sin minacataj de la raketoj en la najbara ruslanda eksklavo kaj konsideras Ruslandon, precipe la revenĝisman politikon de ĝia prezidento Putin,[31] ekstreme danĝera, pro kio tiuj ŝtatoj petis la defendan apogon flanke de la okcidentaj armeoj por bridi la rusajn agresojn, kiuj minacas la najbarajn landojn kaj popolojn. Eblas diri kun ironio, ke per la starigo de militaj raketoj en la lando de Kantio oni lernis nenion el la historio kaj eĉ kondukis la filozofion de Kantio al la absurdo. Estas bedaŭrinde, ke la lando de Kantio, kiu verkis pri la eterna paco kaj la bono en la homo, fariĝis unu el la plej danĝeraj zonoj de Eŭropo. Anstataŭ proklami ĝin neŭtrala senarma tereno, la obstrukcianta moskva politiko misuzas ĝin kiel militbazon kontraŭ la Okcidento. Necesas rekonsciigi, ke Kaliningrado antaŭ 1945 ne apartenis

[28] La plej bona sovetia biografio pri Kalinin eble estas tiu de Anatolij Tolmaĉov, kiu aperis ruslingve en 1974 en Sovetunio kaj estis tradukita al la germana por aperi en iu GDR-eldonejo en 1986. Ĉi tiu biografio prezentis Kalinin kvazaŭ kiel pozitivan alternativon al la sangavida potenculo Stalin, kies nomo estis diskreditita ekde februaro 1956 en la sovetia bloko kaj apenaŭ menciita en la biografioj, kiuj aperis post lia morto. Nature, temas pri historiogafie tre unuflanka rakonto kun ĝiaj tipaj terminologio kaj tabuoj pri la tiklaj momentoj de la bolŝevisma kaj stalinisma historio, kiuj estas aŭ tute prisilentataj aŭ modele ĉirkaŭinterpretataj, ekzemple la milionoj da viktimoj, kiujn kaŭzis la stalina teroro (kiu estis termino neekzistanta en tia biografio). En la libreto de A. Dement´ev (APN 1975), alia oficiala sovetia poeto pri Kalinin, evidentigis tiujn tendencojn de la prisilentado eĉ pli radikale.

[29] Ankaŭ en okcidenta Germanio la jura persekutado de militaj kulpuloj estis grave prokrastata post la milito; ekzistas kazoj, en kiuj komencitaj jurprocesoj estis ĉesigitaj, ekzemple en la kazo de la masakro de Ĥatyn en Belorusio (1943), por kiu neniu germana kulpulo estis punita en Germanio.

[30] Vd. http://www.alexanderyakovlev.org/fond/issues-doc/66195. Ĉi tiu dokumento mencias ankaŭ konkretajn ciferojn pri persekutitaj kaj mortigitaj personoj en la koncerna periodo en Sovetunio.

[31] Laŭ tutruslanda tendenco, en la prezidantaj elektoj de 2018 la kaliningradanoj voĉdonis plimulto por Putin, nome 73-75 %, la komunistoj ricevis ĉ. 11 %, Ĵirinovskij ĉ. 5 %. La „liberalaj reformistoj" Sobĉak kaj Ĵavlinskij ricevis kune ĉ. 6 %.

al Ruslando, do temas pri okupata fremda kampo, eĉ se la internacia komunumo jam delonge agnoskis tiun fakton.

Kiel ilustras ĉi tiu artikolo, Kaliningrado estas ligita kun multaj temoj kaj epizodoj, kiuj ŝajne havas ion komunan. Anstataŭ okupiĝi pri taŭga baptado de la kaliningrada flughaveno, estus eble pli utile diskuti pri la renomado de tiu urbo mem por senŝarĝi ĝin de la krima sovetia pasinteco kaj doni al ĝi humanisman identecon. Eble la tragedio de Königsberg-Kaliningrad, kie en la nomo de la naciismo, antisemitismo kaj komunismo estis plenumitaj neimageblaj krimoj, trovus sian finon.

Laŭ mia persona opinio, la reelekto de Königsberg kiel nomo por Kaliningrado havus neniun sencon, ĉar, kiel dirite, Königsbergo jam de longe ne plu ekzistas. Mi eĉ ne havas ideon kian novan nomon oni povus doni al tiu urbo. Do, ĝi eble konservu sian nunan nomon por konsciigi la homaron pri la hororo de la milito kaj la krimoj de la sovetia reĝimo, kvazaŭ kiel granda monumento.

Andreas Künzli, januaro 2019

Utiligitaj fontoj:

https://www.preussische-allgemeine.de/nachrichten/artikel/anschlag-auf-kant-denkmal-in-koenigsberg.html

https://www.newkaliningrad.ru/news/briefs/incidents/21197868-imya-vraga-v-kaliningrade-oblili-kraskoy-pamyatnik-kantu-foto.html

https://www.interfax.ru/russia/639588

https://www.vesti.ru/doc.html?id=3088115

https://www.youtube.com/watch?v=DOu3iOXl_dM

https://www.novayagazeta.ru/news/2018/11/27/147112-v-kaliningrade-oblili-kraskoy-pamyatnik-immanuilu-kantu

https://russian.rt.com/russia/news/576998-kant-kaliningrad-kraska-vandaly

https://iz.ru/816985/2018-11-27/vandaly-oblili-kraskoi-pamiatnik-kantu-v-kaliningrade

https://rg.ru/2018/11/27/reg-szfo/v-kaliningrade-oblili-kraskoj-pamiatnik-kantu.html

https://kgd.ru/news/incident/item/77553-v-kaliningrade-otmyli-isporchennyj-vandalami-pamyatnik-kantu

https://vesti-kaliningrad.ru/v-kaliningrade-rozovoj-kraskoj-oblili-pamyatnik-kantu/

https://www.bbc.com/russian/news-46355156

http://www.laender-analysen.de/russland/pdf/RusslandAnalysen363.pdf?utm_source=newsletter&utm_medium=email&utm_campaign=Russland-Analysen+363&newsletter=Russland-Analysen+363

https://www.kantiana.ru/news/148/199047

https://de.wikipedia.org/wiki/Ostpreußen

https://de.wikipedia.org/wiki/Luftangriffe_auf_Königsberg

https://de.wikipedia.org/wiki/Schlacht_um_Königsberg

https://de.wikipedia.org/wiki/Königsberg_(Preußen)#Sowjetunion

https://de.wikipedia.org/wiki/Immanuel_Kant

https://www.perlentaucher.de/buch/juergen-manthey/koenigsberg.html
https://www.swissbib.ch/Record/261712373 (aparte pri Kantio vd. precipe p. 117-70)

https://www.zeitschrift-osteuropa.de/hefte/2003/2-3/ein-diener-seines-herrn

https://de.wikipedia.org/wiki/Michail_Iwanowitsch_Kalinin
https://ru.wikipedia.org/wiki/Михаил_Иванович_Калинин

http://statehistory.ru/1151/Vsesoyuznyy-starosta-M-I--Kalinin---radetel-za-unizhennykh-i-oskorblyennykh

Parolado de M. Kalinin (1919)
https://www.youtube.com/watch?v=ufUJqXaQ7CE

M. Kalinin en Norda Osetio (1934)
https://www.youtube.com/watch?v=fo9h6ZU7tIc

Novjara parolado de M. Kalinin (31.12.1942)
https://www.youtube.com/watch?v=xBywzGdzUmU

Novjara parolado de M. Kalinin (31.12.1943)
https://www.youtube.com/watch?v=2Darxj5xt70

https://www.swissbib.ch/Record/264229037

https://www.swissbib.ch/Record/293535566

https://www.swissbib.ch/Record/162761678 (Kalinin, p. 340-42)

https://www.swissbib.ch/Record/036415286 (Kalinin, p. 229)

https://www.swissbib.ch/Record/176527656

http://www.alexanderyakovlev.org/fond/issues-doc/66195

http://tatianis.ucoz.ru/publ/4-1-0-54

https://www.litmir.me/br/?b=232663

https://www.welt.de/politik/ausland/article176090499/Iskander-Russland-stationiert-Raketen-in-Kaliningrad-Reichweite-bis-nach-Berlin.html

http://www.spiegel.de/politik/ausland/russland-laesst-iskander-raketen-in-kaliningrad-auffahren-a-1206355.html

https://www.youtube.com/watch?v=XPNaK0hfKDc

Pri iama orienta Prusujo / kaliningrada distrikto nuntempe:
https://www.youtube.com/watch?v=g14dvjPWKzQ

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, januaro 2019

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

La aŭtoro vizitis Kaliningradon en somero 2005.